# TESTO 35

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Al vi ne plaĉis **s** ␣ **t** ␣ **l** ␣, laboru per martelo.

**2.** Restu ␣ ␣ **jl** ␣ **r** ␣ ĉe sia laboro.

**3.** Tio estas grundo kvazaŭ kreita por dancado, plata kiel telero, duone **d** ␣ **g** ␣ **l** ␣ ␣ **t** ␣ neĝo sur musko.

**4.** Ĉiuj vivantoj, ĉu ␣ **n** ␣ **m** ␣ **l** ␣ ␣, plantoj, fungoj, bakterioj, eĉ protobakterioj, portas la instrukciojn de sia vivo en la genoj.

**5.** La malpura ŝipa ␣ ␣ **b** ␣ ne ricevis eĉ la permeson iri sur la teron.

**6.** Ramzes ne bedaŭris, ke Kareso foriris: ŝi mirigis lin, sed ne **r** ␣**v**␣ ␣.

**7.** Laŭ statistiko eldono de averaĝa esperanta libro donas ␣ ␣ **f** ␣ **c** ␣ **t** ␣ ␣ de 1243 dolaroj. – Ĉu oni povas plifavorigi la situacion? – Jes, aĉeti la librojn.

**8.** La ekstreme malaltaj sonoj, kiujn oni povas similigi al la plej malaltaj sonoj de orgeno, ebligas al ␣ **l** ␣ **f** ␣ **nt** ␣ ␣ interkomunikiĝi je plurkilometra distanco.

**9.** La vinindustrio en la lando spertas notindan ␣ **r** ␣ **z** ␣ ␣ rilate enlandan konsumadon (eble ankaŭ pro la ekonomia krizo), favore al biero aŭ al abstinado.

**10.** Ĉio restis plena de vivo, la **k** ␣ **k** ␣ **l** ␣ krietadis kaj la alaŭdo triladis, oni sentis la belegan printempon.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Jam baldaŭ sian **f** ␣ **br** ␣ **k** ␣ ␣ en Rusio planas konstrui *Atlas*, la pola gvidanto de gluoj por glazuro kaj terakoto.

**2.** Ŝajnas al mi, ke la aŭtoro ektiris ĉaron iom pezan, dezirante sur apenaŭ okdek paĝoj disvolvi tutan **dr** ␣ **m** ␣ ␣ kun prologo, apogeo kaj epilogo.

**3.** Eĉ nuntempe ekzistas nur kelkaj malsanoj, kiujn la homo povas ricevi de **s** ␣ **m** ␣ ␣ ␣.

**4.** Kiam vi grave malsaniĝas aŭ estas viktimo de akcidento, oni verŝajne transportas vin al **h** ␣ **sp** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ por flegi vin.

**5.** Sur ambaŭ bordoj de Nilo kolektiĝis densaj amasoj da homoj, malpacience atendantaj la **s** ␣ **gn** ␣ **l** ␣ ␣ pri la leviĝo de la rivero.

**6.** Pro la sukceso de Holmes, Doyle fakte eĉ provis “murdi” lin, sed la **a** ␣ ␣ **t** ␣ **t** ␣ de la publiko estis nesatigebla – la legantoj postulis pli da aventuroj.

**7.** Policanoj arestis Dotcom kaj li restis en karcero dum kelkaj semajnoj dum **a ␣ v ␣ k ␣ ␣ ␣ ␣** diskutis eventualan kaŭcion.

**8.** Revenis hejmen miloj da irlandaj elmigrintoj por okupi bone pagatajn **p ␣ st ␣ n ␣ ␣ ␣**.

**9.** Kami sciigis, ke li intencas grimpi Evereston 25 fojojn, li volas tion fari nur pro sia pasio grimpi tiun monton, kaj ne pro iu celo rompi **r ␣ k ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣**.

**10.** Por kapti ankaŭ la tratempan evoluadon de la frazeologisma enuziĝo en Esperanto, la aŭtorino krome esploris kelkajn malnovajn **r ␣v␣ ␣ ␣ ␣** el la jaroj 1923 ĝis 1935.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

ribel', alkohol', pulm', baz', turn', brak', rev', fleks', normal', plekt'.

**1.** La kompatinda birdo laŭte plendis pri sia perdita libereco kaj frapadis per siaj flugiloj la metalfadenan **␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ ĵ ␣ ␣** de la kaĝo.

**2.** De la tago de mia edziĝo mi uzis nenian **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ĵ ␣ ␣**, nur kvar fojojn en jaro mi trinkas glaseton da vino.

**3.** La princo vere devas sin gardi, ke oni ne proklamu lin perfidulo kaj **␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ l ␣** kontraŭ la fundamentaj leĝoj de la ŝtato.

**4.** La du amikoj neniel similis unu la alian: Ĥorj estis pozitiva, praktika, administrema, racia homo; Kaliniĉ, male, apartenis al idealistoj, romantikuloj, ekzaltitaj kaj **␣ ␣v␣ m ␣ ␣** homoj.

**5.** Tro da rigoro malmultigas niajn vicojn, prudenta **␣ ␣ ␣ ␣ s ␣ ␣ l ␣ c ␣** plimultigos ilin.

**6.** La gnom-hobita bando procedas tra serio de ĉiam pli defiaj kaj malagrablaj situacioj, el kiuj ili ĉiam sukcesas **␣ l ␣ ␣ r ␣ ␣ ĝ ␣** per kombino de aŭdaco, sagaco kaj bonŝanco.

**7.** Grupo el Pakistano – ĉi-foje komercistoj kun validaj vizoj – estis malliberigita dum tuta semajno, ĉar oni **␣ ␣ n ␣ ␣ z ␣** kredis ilin kontraŭleĝaj enmigrantoj.

**8.** Ni afable traktis la militkaptitojn; niaj soldatoj kaj oficiroj dum la militpaŭzoj iris al la antaŭpostenoj kaj preskaŭ **␣ r ␣ ␣ ␣ m ␣ ␣** la malamikojn, eĉ trinkis vodkon kun ili.

**9.** En Ĉinio memmortigo iĝis unu el la kvin grandaj mortokaŭzoj (kune kun apopleksio, bronkito, hepata kancero kaj **␣ ␣ l ␣ ␣ t ␣**).

**10.** En Kenjo unuarigarde oni trovas konfliktojn kaj problemojn, sed duarigarde oni vidas **␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ c ␣ ␣**, ja evoluon al progreso kaj prospero.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La procesoj daŭras senfine, kaj kostas multege kaj plej malbone, necesas pagi por ricevi juston – la tribunalo ja ne komencos ___ sen antaŭpago al la juĝisto kaj liaj subuloj.

**a.** velki **b.** konfuzi **c.** paŭzi **d.** procedi

**2.** Mi estas ankaŭ komercisto kaj scias, ke pli saĝe ol ___ sian varon estas demandi la klienton, kian varon li deziras kaj klopodi proponi ĝin al li.

**a.** tegi **b.** varii **c.** reklami **d.** munti

**3.** Litovoj ___ kun siaj kolegoj de *Estonian Air,* ke ambaŭ kompanioj kunlaboros en vendado de biletoj kaj efektivigo de rektaj kaj konektaj *flugoj*.

**a.** kontraktis **b.** melkis **c.** naŭzis **d.** observis

**4.** La sola diferenco al la nuna Rusio estis, ke la tiama ŝtato ___ al la malriĉuloj vivnivelon sen malsato – nun la novaj kapitalistoj tute ne havas intereson pri la malriĉuloj.

**a.** ŝovis **b.** migris **c.** garantiis **d.** putris

**5.** Esperanto estis por mi speciala motivo, tial mi skribis leterojn, pagis ___ kaj atendadis respondojn.

**a.** ŝmiron **b.** ronkon **c.** kritikon **d.** afrankon

**6.** Kiam la rabisto, taŭga kiel ĉefrolulo de humuraĵo aŭ de ___ filmo, estos konvaleskinta, atendos lin proceso pro la raboprovo.

**a.** ĵaluza **b.** inklina **c.** komika **d.** humida

**7.** En ĉiu urbego, urbo aŭ vilaĝo, kie estas pavimo, ŝtona trotuaro aŭ teraso, la tuta ___ estas makulita de milionoj da tretitaj pecetoj da maĉgumo.

**a.** surfaco **b.** parko **c.** nodo **d.** sklavo

**8.** Ramzes atente observis, ĉu la soldatoj havas bonajn armilojn kaj varmajn mantelojn por la nokto, ĉu sufiĉos la ___ de panbiskvitoj, viando kaj sekigitaj fiŝoj.

**a.** profesio **b.** ombrelo **c.** sojlo **d.** provizo

**9.** Por argentinanoj, kiuj loĝas en la vastaj ebenaĵoj, la supreniro al nordaj provincoj Tukumano, Salto kaj Jujujo estas okazo ekvidi belajn ___ kaj sperti plezuron.

**a.** sitelon **b.** pejzaĝojn **c.** pelton **d.** urson

**10.** Unu el la plej facile uzeblaj kaj plej malmultekostaj specoj de energio estas la ___ (hidraŭlika) energio de la akvo.

**a.** inteligenta **b.** kompleta **c.** serena **d.** mekanika